

**MUUSSES**

**ESPERANTO BIBLIOTEKO**

REDAKCIO: J. GLÜCK, T. JUNG KAJ J. H. J. WILLEMS

Nr. 52

**No. 10**

**LA JUBILEA KONGRESO DE  
ESPERANTO 1912**

(LA VIIIa KONGRESO EN KRAKÓW)

REMEMORAĴOJ KAJ OFICIALAJ DOKUMENTOJ

ARANGIS KAJ KOMPILIS

**JULIUS GLÜCK**



ESPERANTO-ELDONEJO

**J. MUUSSES — PURMEREND**

(Nederlando)



M U U S S E S  
E S P E R A N T O B I B L I O T E K O

— REDAKCIO: J. GLÜCK, T. JUNG KAJ J. H. J. WILLEMS —

No. 10

LA JUBILEA KONGRESO DE  
ESPERANTO 1912

(LA VIIIa KONGRESO EN KRAKÓW).

REMEMORAĴOJ KAJ OFICIALAJ DOKUMENTOJ.

ARANĜIS KAJ KOMPILIS

JULIUS GLÜCK



ESPERANTO-ELDONEJO

J. MUUSSES — PURMEREND

(Nederlando)

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj

Copyright 1937

by

J. MUUSSES

—

PURMEREND

Esper. 445 I



I - 11213

*Dediĉita al la Ora  
Jubilea Kongreso de Esperanto*

## ENKONDUKO.

En la jaro 1909 „La Ligo de germanlingvaj aŭstriaĵoj grupoj esperantistaj” (Wien) turnis sin pro aranĝo kaj invito de la VIIIa Universala Esperantista Kongreso al la dek plej gravaj urboj en la tiama aŭstria-hungaruja monarkio kaj ricevis plejparte tre favorajn respondojn. En la sama jaro ĝi sendis al la Konstanta Kongresa Komitato (K. K. K.) petskribon okazigi la okan U. E. K. en la aŭstria-hungaruja regno.

En la jaro 1910 okazis en Wien tutaŭstria Esperanto-kongreso, kiun partoprenis la esperantistoj de ĉiuj tieaj nacioj. La kongresanaro unuvoĉe akceptis la inviton de la polaj samideanoj, festi la 25 jaran jubileon en la pola, historie fama urbo Kraków.

La kongreso estis unuaranga, impona kaj por nia movado fruktedona.

La dua kongresa vicprezidanto, s-ro Stanislaw Rudnicki, la lerta organizanto, aperigis Jubilean Albumon, kiu estas bele kaj riĉe ilustrita, enhavanta fotografaĵojn kaj la kompletan liston de la kongresanaro.

La komitato honorigis min, skribi la tekston por tiu historia libro kaj aldonis kelkajn notojn.

Ĉar tiu Jubilea Albumo apartenas al la ne plu haveblaj bibliografiaj maloftaĵoj, la redakcio de M.E.B. decidis reeldoni ties tekston.

Tiu ĉi libreto enhavas, krome, la lastan oficialan kongresparoladon de D-ro Zamenhof.

Pro tio ke la rusa registaro malfavoris Esperanton,

la Jubilea Kongreso ne povis okazi en Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto. Tio instigis la poeton Antoni Grabowski, verki sentoplenajn poemojn, kiujn ni ankaŭ aldonas, escepte de „La Tagiĝo”, kiu fariĝis la dua Esperanto-himno kaj certe estas konata de ĉiu esperantisto.

Ĉi tiu historia libreto estas dediĉita al la „Ora Jubilea Kongreso”, kun la deziro, ke la nuna samideanaro havigu al si bildon pri la tiama Esperanto-periodo kaj eksciu iom pri la belaj ok festotagoj post kvaronjarcenta sindona kaj plej malfacila laboro por Esperanto.

JULIUS GLÜCK.

---

## AL LA KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ ESPERANTISTAJ!

La Ligo de germanlingvaj aŭstriaĵ grupoj esperantistaj havas la honoron, prezenti al la tutmonda esperantistaro koran inviton por Tutmonda Esperanto-Kongreso en la aŭstria-hungaruja monarĥio dum la 1912a.

En Aŭstrio-Hungarujo la indiferenteco de la granda amaso de la loĝantaro rilate al la internacia helpa lingvo Esperanto — bedaŭrinde — estas ankoraŭ tre granda. La naciaj malkonsentoj ankaŭ ne lasas tempon por pripensi nesupereblajn profitojn, kiujn ĝuste al tiel multlingva lando, kia estas tiu de la aŭstria-hungaruja monarĥio, alportus la uzado de neŭtrala lingvo.

Por montri evidente la eblecon de ekzisto kaj la uzeblecon de tiu ĉi lingvo, kiun la tuta mondo posedas feliĉe jam de pli ol dudek jaroj, al la multaj diversaj nacioj en Aŭstrio-Hungarujo, por akiri per imponanta manifestacio de la tutmonda esperantistaro en tiu ĉi ankoraŭ ne sufiĉe almitita teritorio novajn arojn da adeptoj, por venki ankaŭ tie la antaŭjuĝojn kontraŭ internacia helpa lingvo per nefordisputebla praktika ekzemplo laŭ granda mezuro, estas necese, kunvoki tutmondan Esperanto-Kongreson en tiun ĉi ŝtaton.

Cetere la multegaj ĉarmoj pejzaĝaj, per kiuj la aŭstria-hungaruja monarĥio estas distingita de la naturo en ĉiuj siaj partoj, promesas al la gekongresontoj agrablajn tagojn kaj multajn diversajn plezurojn dum ekskursoj kaj aliaj kongresaranĝoj. La gastemeco de la

loĝantaro kaj la fervoreco de la ekzistanta jam en tiu ĉi ŝtato esperantistaro garantias bonan akcepton kaj ĝojigan restadon.

Fine, kaj plej grave: La ideo, inviti tutmondan Esperanto-Kongreson en la aŭstria-hungarujan monarĥion, vekis tiom da intereso en gravaj korporacioj (urbestroj, komercaj ĉambroj, unuiĝoj por interkomunikiĝo de fremdlandanoj k.a.) de diversaj ĉefurboj en kelkaj provincoj, ke eĉ estas neeble, nomi momente iun certan urbon kiel kongresurbo por la tutmonda Esperanto-Kongreso dum la 1912a, sed ke la humile subskribita Ligo povas inviti nuntempe la tutmondan esperantistaron nur principe en la aŭstria-hungarujan monarĥion, rezervante al si proponon de certa urbo dum la Esperanto-Kongreso de la venonta jaro.

La humile subskribita Ligo do permesas al si, interkonsente kun ĉefaj, hungaraj, italaj, kroataj kaj polaj samideanoj same kiel en la nomo de ĉiuj germanlingvaj esperantistoj en Aŭstrio-Hungarujo, plue apogante sin sur konsentoj de diversaj urboj en la ŝtato kaj de multaj gravaj korporacioj, inviti la tutmondan esperantistaron por kongreso dum la 1912a en la aŭstria-hungarujan monarĥion kaj petas insiste afablan akcepton de tiu ĉi invito.

Wien, en aŭgusto 1909.

Sekretario,

Vicprezidanto,

JULIUS GLÜCK.

JOHANN SCHRÖDER.



## Parolado de D-ro L. L. Zamenhof

ĉe la malfermo de la Oka Kongreso en Kraków, de la  
11a ĝis 18a de Aŭgusto 1912,  
ĉirkaŭ 1000 partoprenintoj.

Prezidinto D-ro MIKOLAJSKI.

La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĵus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam — post longa naska preparado — aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Kion signifas dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo, tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ

en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj, pacience ĵetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! Grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun meditigas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton,

neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povas kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute neniu diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progesado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano, kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniom diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute preci-

zan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, — tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo. —

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi; kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj neeminentuloj, mi citos neniun nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van der Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro de ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston, kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrabloj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj. —

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi

petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi „majstron”, ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: „tion mi postulas” aŭ „tion mi deziras”. Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉion, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donadis al mi, kvankam ĝi en

efektiveco koncernis nur la aferon de la lingvo, fortenis de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estis simpatia kaj kiuj timis, ke, fariĝante esperantistoj, ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu „majstro”, ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniu el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu

esperantisto *aparta*, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la Esperantaj *kongresoj*, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur *privataĵo*, kiu povas eble esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identita* kun ĝi. —

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo! Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto! Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava"! Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estimon kaj konfidon* por ĝi.

Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj „espero, obstino

kaj pacienco"; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem.

En la lastaj jaroj ni badaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: „konkordo”.

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrade seniluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: „ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia „kanto de cigno”, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco, per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni?”

Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantisman, pri ĝia esenco kaj esperablaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.



Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento, — tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento, ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo la plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon ni esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron!

# RAPORTOJ

el la

Jubilea Universala Kongresa Esperantista

ALBUMO,

KRAKOW 1912.

Jam en pratempoj la homaro posedis la misteran emon por pilgrimado kaj ĉi tiun emon ni heredis de niaj antaŭuloj. Pilgrimadoj, solene aranĝitaj vizitiroj al sanktaj lokoj ekzistis jam en antikvaj tempoj. La grekoj kaj la romanoj festvojaĝis al malproksimaj temploj, la hebreoj dum la festotagoj vizitis Jeruzalemon, la teŭtonoj migris al sanktaj arbaretoj, kaj en la nunaj tempoj la kristanoj pilgrimas al la tomboj de siaj sanktaj martiroj kaj la mahometanoj al Mekka.

Ĉiuj pilgrimadoj havas tion komunan, ke nur la samreligianoj povas en ili partopreni, ke nur la samkreduloj komprenas la altan inspiron, la neklarigeblan misteron kaj la internan senton. Tial alireligianoj, ofte ne povante kompreni la kaŭzon de l' pilgrimekscito, kontraŭstare rigardas ĉi tiun pilgrimadon de alipensulo. En la mondon venis nova sento. La nova sento intuicie kunigis la disigitajn tamen komunajn pilgrimsentojn. Per la mistera rimedo de 16 simplaj lingvaj reguloj ĝi enblovis al ili spiriton de sia spirito. La Zamenhof'a genio kreis ion misteran, kio venas el koro, en koron sin enigis kaj mistere efikas, ke nacio estas estimata de alinaciano,

politikulo ŝatata de kontraŭulo, religiano trovas indan estimon de alireligiano, ĉiu homo estas valora membro de la granda homa familio. Li vidas en sia proksimulo *nur* homon, fraton. Zamenhof, la geniulo, efektivigis idealon de l' homarunuco, revita jam de pratempoj. Kion la fondintoj de diversaj religioj deziris kaj provkonstruis, kion sennombraj apostoloj serĉis, tion kreis genie *unu* viro. Li elsorĉis komunan pilgrimejon, kiu estas samtempe celo de ĉiu homo ideala. Li donis al la internacia homaro ideon de l' kongresurboj, kie kunvenas ĉiujare homoj diversnaciaj, diversreligiaj, por ebligi - paŝo post paŝo - mondpacon, por plialtigi reciprokajn homestimajn, por glori homfratigon, por sanktigi la feston de la plej altaj idealoj, je kiuj la deziro plenigas la koron de ĉiu grandanimulo. Almenaŭ dum la kongresoj la homidealistoj vidas sian revon efektivigita.

Ni pilgrimas al kongresoj.

Post nia alveno tuj iom post iom pli forte eksonetas en niaj koroj sonoj ne komprenataj, pli kaj pli fortiĝantaj, ĝis kiam ekvibras nia tuta interno de ia mistera sento, de ia mistera forto.

*Nun ni estas fratoj.*

Preskaŭ senkonscie io gvidas nin al la plej altaj regionoj de l' homindeco, ni eniras kortuŝite, ravite en la regionon de la alta religio, kie estas komuneco de nacioj kaj gentoj; ni sentas, ke ni vivas en regiono, kie majeste regas la interna ideo de *esperantismo*.

Ni pilgrimas al kongresoj.

Ni vidas entuziasmon, ni konatiĝas kun centoj da noblaj apostoloj de la nova sento. Nian propran entuziasmon pliriĉigas fortoj ĝis nun nekonataj, subtilaj; la amo por nia kara lingvo pli forte estas alforĝita al nia

tuta penso, nerompebaj ĉenoj ligas ĝin al nia koro, al nia animo. Ni ĉerpas fortojn preskaŭ superhomajn, por ke ni, reveninte hejmen, kun pli fortaj entuziasmo kaj amo disvastigu, diskonigu nian lingvon. Tiaj estis ankaŭ la impresoj dum la kongreso en Krakovo.

La meritplenaj laboroj, la laŭdinda gastamo de niaj polaj Esperantaj fratoj ebligis, ke ĉiuj kongresanoj sentis, ke en la mondo ekregas nia sankta afero al ni ĉiuj jam bone konata, de ni ĉiuj bone komprenata, laŭ ĝia grava valoro por la bonfarto de ĉiuj popoloj.

Dum la Krakova Kongreso tra la mondo esperantista iris la forta voko de du vortoj, kiuj per la forta volo de l'pacaj batalantoj ĉiam estu, ja, estos la devizo de nia movado:

*Unueco, Konkordo!*

La kongresanoj pro amo al Esperanto, pro amo al nia gvidanto, solene priĵuris ja dum la Krakovaj tagoj la *duan parton de la Fundamento*, egalrajtan kun la ĝisnuna la unua, dirante:

Ni, fideluloj al Fundamento, deklaras, resti fidelaj al paco, unueco, konkordo.

Kaj tion kreis nia — li permesu al ni lastfoje nomi lin tiel — „kara majstro”, dirante dum la malferma kunsido jenajn orvalorajn vortojn:

„Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo! Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto! Neniam

permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava”! Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune”.

En alia parto de sia parolado D-ro Zamenhof diris: „En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj „espero, obstino kaj pacienco”; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas „*konkordo*”.

Tiel parolis Zamenhof. Dum tiu parolado li ankaŭ petis ne nomi lin plu majstro. Sed mia mano, gvidata de mia sento, rifuzas ne skribi la vorton majstro. Zamenhof, nia estra gvidanto, montris ĉiam kaj precipe dum tiu kongreso, ke li ne nur meritas la titolon majstro el vidpunkto de nia sankta afero, sed eĉ la titolon „*majstro de la modesteco*”.

Aŭskultante, neniam diskutante, li per mutaj vortoj kvazaŭ alparolis nin: — esperantistoj ne parolu senbezone, ne disputu, sed laboru diligente!

Kvazaŭ amanta kaj amegata patro li estis inter sia adeptaro. Kvankam li petis, ke oni ne glorigu lian personon, kvankam li nur modeste sidis en la aŭdantaro, tamen en multaj rilatoj ni ne povas sekvi liajn admonojn. Ĉu homoj povas malheligi sunon, aŭ ne admiri naturan belecon? Provu kontraŭstari! provu! Brila sunradio,



ridetanta rozfloro venkos vin. Provu, ne admiru nian majstron! — Provu rigardi lin kiel simplan kunbatalanton!

Unu rigardo el liaj okuloj, kiuj diras al vi, ke en lia koro kuŝas neelĉerpebla boneco, ke en lia animo ĉiunmomente naskiĝas altaj pensoj por la bono de l' homaro, devigas vin mirrigardi en li homon kun eksterordinaraj ecoj. La boneco kaj modesteco, la simpleco kaj grandiozeco de nia eks-majstro ĉiam leĝe ordonas al ni, ke kontraŭ lia volo ni ĉiam vidos en li la majstron. Sed tamen, obeante al lia nobla deziro kaj respektante lian volon, ni kun profunda bedaŭro ne volas plu lin tiel nomi.

Por la partoprenintoj la belaj kongrestagoj en Krakovo restos neforgeseblaj.

Je memoro de ĉi tiuj festotagoj de l'Oka Kongreso, kiu samtempe estis la jubileo de 25-jara laboro, estis kiel agrabla aldono kreita „Jubilea Albumo”: multvalora memoraĵo kaj dokumento samtempe por ĉiuj, kiuj en profundo de sia koro gardas fidele nian karan Esperanton.

J. Gl.

---

## LA JUBILEA KONGRESO.

Dum la tagoj de la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto 1912 la historie konata urbo Kraków, la koro de Polujo, salutis korege per flagaro nacia kaj esperanta la alvenintajn esperantistojn. De multaj domoj flirtis standardoj kun la kvinpinta verda stelo. Eĉ la elmontraj fenestroj kaj la enirejoj de l' vendejoj estis riĉe drapitaj.

Ne estas granda la nombro de urboj, pri kiuj oni

povas rakonti, ke, alveninte tien, oni sentas sin de la unua momento hejmece. Al tiuj malofte troveblaj urboj apartenas certe ankaŭ la kongresurbo Kraków, kiu akceptis kaj salutis inter siaj muroj kun vere proverba pola gastamo la reprezentantojn de multaj nacioj kaj gastigis ilin je maniero, kiu restos por ĉiam neforgesebla al la kongresanaro.

Kun tuta objektiveco oni povas konstati, ke la organiza komitato estis zorginta pri ĉio, por aranĝi tiun jubileon de Esperanto kiel eble plej solene. Specialan dankon inter multaj meritas s-ro Prof. Odo Bujwid, la afabla prezidanto de la loka Organiza Komitato, helpata de s-roj D-ro Rosenstock kaj St. Rudnicki. Se en aliaj kongresurboj kunvenis pli multenombra samideanaro, la Oka estis, por tiel diri, pli intima festo, kies influo por nia movado restos ĉiam potenca.

Por honori la genian elpensinton de Esperanto, la filon de pola tero, kiu antaŭ 25 jaroj al la mondo donis la plej gravan donacon, per kiu geniuloj iam ajn feliĉigis la homaron, la dankema esperantistaro pilgrimis en la malnovan polan metropolon, ĉar Varsovio, la urbo kie Zamenhof loĝas, pro diversaj kaŭzoj ne povis esti elektata kiel kongresejo. La esperantistoj ne bedaŭris la elekton de Kraków. La granda afableco kaj simpatio de la tieaj oficialaj reprezentantoj, la kora akcepto de la Krakovaj aŭtoritatuloj donis al la kongresanoj la senton, ke en la kongresurbo ili estas kvazaŭ hejme. La modela organizado, la preciza funkciado de ĉiuj aranĝoj kaj la nepriskribebla, neforgesebla gastamo de la noblaj poloj montris, kiun altan gradon la pola nacio atingis en la kulturmovado de l' moderna vivo.

Por raportanto pri la kongreso estas tre malfacila, eĉ

tute ne plenumebbla tasko, priskribi ĉion tiel, ke la legantoj eĉ nur proksimume ricevu ĝustan kaj kompletan bildon de ĉiuj okazintaĵoj. La vortoj restos palaj spegulaĵoj de la grandioza festo, kiu apartenas al la plej belaj en la tuta ĝisnuna historio de Esperanto. — La 11-an de aŭgusto oficiale komenciĝis la jubilea festo.

Antaŭtagmeze la urba Konsilantaro invitis la naciajn reprezentantojn por lunĉo.

Je la tria posttagmeze estis malfermita la inaŭguracia kunsido en la granda salono de „Stary Teatr”. D-ro Zamenhof, akompanata de la vicprezidanto de l’ urbo s-ro D-ro Henryk Szarski, kaj multaj delegitoj suriris la estradon.

Tuj post la alveno de nia amata gvidanto en la nomo de la Konstanta Komitato de Kongresoj s-ro Bourlet salutis la ĉeestantaron kaj deklaris la Kongreson malfermita. — Post la parolado de s-ro Bourlet estis elektata jena estraro: Prezidanto s-ro D-ro Ŝĉepan Mikolajski; vicprezidantoj s-roj Bolingbroke-Mudie (Britujo), Rollet de l’ Isle (Francujo), Behrendt (Germanujo), Grabowski (Polujo), Nedoŝivin (Rusujo); sekretarioj s-roj Chavet, D-ro Rosenstock, kaj Rudnicki.

S-ro D-ro Mikolajski, okupinte la prezidantecan seĝon, donis la parolon al s-ro D-ro Szarski, kiu en Esperanto afable salutis la kongreson. Post tio la oficiala delegito de la aŭstria ministerio por militaj aferoj vic-kolonelo Wladyslaw de Gostomski en la nomo de la registaro transdonis salutojn al la kongreso.

Tiam sekvis bela parolado de Prof. Bujwid, kiu per trafaj vortoj montris la gravecon de Esperanto por la scienca mondo. Ŝtataj kaj regnaj oficialaj delegitoj el eksterlando esprimis bondezirojn por la sukceso de nia lingvo.



Kaj nun D-ro Zamenhof aperis sur la estrado.

Entuziasmegaj aplaŭdoj bruegis tra la salono.

Entuziasmo flamis el la okuloj, misteraj sentoj de sincera sindonemo flugis el la koroj de ĉiuj al la estrado. La majstro komencis paroli.

Klare kaj tre difinite li priskribis la internan parton de nia movado. Denove, sed alimaniere, li montris al ni la solan irotan vojon, laŭ kiu ni nur povas atingi nian celon en gloro. — El liaj vortoj eĥis admonoj de hom-amanto, de homgvidanto.

Ni estas jam multaj. Sed ni estas nur homoj, kiuj interbatalas ofte forgesante la celon kaj irante sur ne-grava apudvojo, ne vidante la ĉefan vojon, kiu kondukas al nia celo. — Li, la plej granda idealisto de la 20-a jarcento, spertis tro ofte, ke la batalantoj por lia ideo, kiam ili volis montri la vojon al homunuiĝo, kiam ili volis gvidi la homaron al paco, devis kaj devas forlasi malindan disputkampon kaj pace kaj konkorde interrilati.

La parolado de nia gvidanto estis apoteozo de konkordo.

Ĉiu kiu volas de nun meriti la noblan titolon „Esperantisto”, ĉiu kiu asertas, ke li agas laŭ la interna ideo de esperantismo, devas de nun ne nur fiksi en si la vortojn de la jubilea parolado de Zamenhof, sed ankaŭ agi laŭ ili, alie li tute ĝuste meritis la riproĉon, ke li malhelpas nian progresadon, nian penplenan antaŭeniradon. La parolado estis aŭskultata kun granda emocio. La konsenta aplaŭdego, kiu ĝin sekvis, estis kvazaŭ signo de spontanea promeso, agi laŭ tiuj noblaj vortoj.

Ĉion detale priskribi ĉi tie, kio okazis dum la kon-

greso, ne estas al mi eble; tial mi ne citos la nomojn de la nacia delegitaro aŭ detale la diskutojn dum la laboraj konsidoj.

Mi nur rimarkigas, ke oni diskutis pri la organizo de la esperantistaro. Tiu debato, kiun multaj esperantistoj estis timintaj, montris, ke Zamenhof'a spirito regas la oratorojn. Grandan impreson faris la parolado de s-ro Bourlet, kiu per sia elokventeco kaj klarigo de la situacio multe helpis la sukceson.

Speciale menciinda estas la bona kaj kviete firma prezidado de D-ro Mikolajski, al kiu oni ĉefe ŝuldas dankon, ke dum la kunsidoj kaj diskutadoj regis ĉiam la plej bonaj harmonio kaj interkonsento.

Gravaj estis la kunsidoj de la Internacia Scienca Asocio, kaj la kongreso de U.E.A. En ambaŭ estis multe da valoraj aferoj priparolataj kaj ellaborataj. Sed speciale gravan rolon ludis dum ĉi tiu kongreso la kunvenoj de T.E.K.A. Ili estis vere la supro de la fakaj kunsidoj. Tio ja ne mirigu nin, ĉar la kongresa prezidantaro konsistis el eminentaj kuracistoj.

Ĝis nun la laboroj estas priskribitaj!

Sed laŭ Zamenhof, niaj kongresoj estu festoj. Liaj samnaciaj fratoj montris al li, ke ili tute komprenas liajn intencojn. Por plezuro kaj amuzo de la kongresanoj oni multe, multe klopodis. La festoj havis familian karakteron. Dum ĉiuj aranĝoj ni estis ĉirkaŭataj de ĝoja kaj plezura atmosfero, kaj malgraŭ la nacia karaktero oni povas nomi tiujn festojn veraj mondfestoj. La diversaj impresoj, la mozaiksimilaj bildoj en multkolora kombinaĵo aperis al rigardanto kiel vivigitaj, nove kreitaj bildoj el la fabellando de Mil kaj unu Noktoj. La festojn komencis humorplena prezentado en „Teatr Nowosci”,

kie la pli frue alvenintaj kongresanoj kunvenis sabaton vespere la 10-an de aŭgusto.

Dimanĉe vespere okazis en la salono de „Pafista Societo” luksa komuna festmanĝo, dum kiu ĉiuj kongresanoj havis okazon interkonatiĝi kaj ĉe militista orkestro gaje babili ĝis malfrua nokto.

Sed kiu aŭdis la poeziaĵojn de Grabowski kaj Belmont, tiu ne forgesos la profundan impreson de vera poetarto, kies fonto estas en la profundo de bonkoreco. Dum la jubilea vespero polaj artistoj kaj kantistoj malkovris al la kongresanaro la popolarton de sia patrujo. La ridoj de belaj polinoj, la sopiroj de junuloj estis aŭdeblaj el la popolaj ĥoroj. Kiel bele kaj ironie Leo Belmont en sia humorplena kaj tamen serioza festparolado mokante vipis la kontraŭulojn, la aŭtoritatojn, kiuj ankoraŭ ĉiam neas la viveblecon de nia lingvo. Per flamaj vortoj, kiuj malkovris la entuziasmon de l' oratoro, kiuj ravis la aŭdantaron, Leo Belmont prikantis la belecon de nia lingvo kaj ties noblan, altan celon.

„Mazepa” kaj „Halka”, du gravaj polaj teatraĵoj, prezentis al la multlingva kongresanaro la potencon teatran arton en Polujo. La firma arto de l' pola aktoraro briligis per Esperanto antaŭ eksterlanduloj unu el la perloj de pola dramliteraturo. „Mazepa”, verko nun sepdekjara, *enhavas* multe da belegaj scenoj, tamen ni modernuloj povas ĝui ĉi tiun verkon nur laŭ poeta flanko. Kaj, ke ni povas ĝui tiun romantikan poeziaĵon, tion ni ŝuldas al la neimitebla tradukarto de nia Antoni Grabowski. Li montris al ni denove, kiun grandan flekseblecon, kiun altan belsonecon posedas nia lingvo. — La aktoraro bonege ludis, bonege parolis.

La operon „Halka” mi ne volas recenzi, ĉar mankas

al mi sufiĉa kompreno por la kvalitoj de muziko. Tial mi nur raportas, ke la impresoj por mi estis same profundaj, ke precipe la beleco de nia kara lingvo montris sin ankaŭ dum la kantadoj. Mi nek aŭdis „literojn kun supersignoj”, nek malfacilan „akuzativon” nek multajn finiĝojn kun „oj”.

Mi aŭdis kaj ĝuis nur nian belsonan vivantan lingvon.

En ambaŭ teatraĵoj nia lingvo triumfis.

Ĵaŭdo, la 15-a de aŭgusto, estis katolika festotago, tial libera de kongresaj laboroj. Ni tamen ne ripozis. Jam je la 9a horo matene okazis katolika diservo en monumenta preĝejo de S-ta Maria, kie predikis anstataŭ bedaŭrinde malsaniĝinta episkopo Bandurski, pastro Stanislaw Szurek. Preskaŭ samtempe okazis diservoj en protestanta preĝejo, kie predikis la fervora samideano, pastro Karol Michejda, lerninte nian lingvon apenaŭ de kelkaj semajnoj, kaj en la sinagogo — je la unua fojo — la hebrea diservo kun elokventa prediko de rektoro Friedrich Saphra el Annaberg.

Post la diservoj kunvenis ĉiuj kongresanoj en la ĉefplaco apud la monumento de *Mickiewicz* por meti florkronon al tiu granda pola poeto, konata ankaŭ kiel profesoro de Pariza „Collège de France”. — Posttagmeze la sciencista mondo per elokventa parolado de Prof. Carlo Bourlet honoris la astronomon *Kopernik* ĉe lia monumento, staranta en la korto de Jagellona Biblioteko, kaj metis tie florkronon.

Nun ĉiuj direktis siajn paŝojn al Arkitektura Ekspozicio, kie okazis publikigo de premiitoj en la Literatura Konkurso. Estis nur tri temoj, inter kiuj la unuan fojon scienca disertacio. Alvenintajn laborojn juĝis tri juĝantaroj: beletristikan sub la prezido de Prof. Th.

Cart, poezian sekcion estris s-ro Ant. Grabowski, kaj sciencan sekcion inĝ. Rollet de l'Isle. Ĉiuj ĉi sekciestroj (profesoron Cart anstataŭis profesoro Bourlet) raportis en malmultaj vortoj pri siaj laboroj, kaj prezidanto D-ro Mikolajski, malferminte la kovertojn kun la nomoj de l' aŭtoroj de la premiitaj verkoj, laŭtlegis ilin kaj disdonis la premiojn. — Bedaŭrinde nur tri premiitoj ĉeestis la kongreson. — Tiun ĉi interesan tagon finis la belega internacia balo, kiu estis grandioza festkunveno kun vere pentrinda impreso. La maro da elektra lumo disradiis ensorĉigan brilon, kaj la multkoloraj bildoj malkovris novan fabellandon. La okuloj de artama rigardanto estis saturataj de la nedifinebla kolordivers-eco, ĉar naciaj kaj historiaj kostumoj el estintaj kaj nunaj tempoj prezentis viglajn bildojn. Ĉiam aperis novaj bildoj, ĉiam novaj impresoj. Inter ĉiuj kostumoj mi unu ne povas forgesi. Ĝi estis tiu de Napoleono la Granda, kiun portis D-ro Rosenstock, kaj kiu faris vere profundan impreson.

Oni estas honorinta min per la tasko priskribi la kongreson. Nur kelkajn impresojn mi volis kaj povis skizi ĉi tie kaj, por kompletigi ilin, mi ne povas preterlasi la vizitadon de en la mondo unika vidindaĵo: salminejo en Wieliczka. Jam la akcepto ĉe la ornamita stacidomo en Wieliczka, kiun faris en Esperanta lingvo la urbestro D-ro Franciszek Aywaz, estis por ni tre agrabla surprizo. Fine la tuta labirinto de kilometre longaj koridoroj, lumigitaj per miloj da lanternetoj de ministoj, grandegaj kelkdekmetraj kavernoj kun lagoj, lumigitaj per diverskolora lumo, kapeloj kun statuoj, dancsalono, stacidomo, ĉio ĉi el nigraverda salo, en profundeco de 140 metroj, kun la ludanta orkestro, faris nepriskribeblan, neniam forgeseblan impreson.

Jam el tiu skizo evidentiĝas, ke la kongreso antaŭenpuŝis la rasan kaj nacian konkordojn, kaj ke denove triumfis la idealoj de homaj frateco kaj egaleco.

La kongreso montris, ke la ideo de popola interfratiĝo ne estas utopio, ke ĝi estas efektivebla, kaj la kongresanaro sukcesis pruvi al la batalanta mondo, ke ni estas fidelaj pioniroj de tiu alta sankta ideo, kiu alportos al la homaro vere feliĉegan tempon.

Forta volo kaj modela disciplino de popola amaso estis la kongresa devizo. En la belega raporto pri kongreso skribas Ned Katryn en „Lingvo Internacia”:

„Apud Krakovo staras artefarita monteto, konstruita de la Krakovanoj por honori la memoron de Kosciuszko, la heroo de pola sendependeco. Oni rakontas, ke ĉiuj loĝantoj, riĉaj aŭ malriĉaj, potencaj aŭ humilaj, konsideris kiel honoron labori por ĉi tiu konstruado. Studentoj manumis ŝovelilojn kaj profesoroj puŝis radportilojn. Eĉ la plej nobelaj sinjoroj, la plej junaj infanoj alportis sian pecon da tero, simbolon de amo kaj sindono al la komuna patrujo.

Similaj al ĉi tiuj polaj patriotoj, ni, esperantistoj, alportu ĉiuj nian pecon da tero al la konstruaĵo, kiun ni penas starigi por la estonta progreso de la homaro. Ĉiuj, riĉaj, aŭ malriĉaj, potencaj aŭ humilaj, maljunaj aŭ junaj, virinoj kaj infanoj, ni laboru laŭ nia povo, laŭ niaj fortoj. Tia estas la instruado, kiun kunportos el Krakovo tiuj, kiuj havis la honoron resonigi Esperanton, vivantan lingvon en vivanta Polujo.”

Ni esperantistoj jam multe da tero alportis al tiu konstruaĵo. Sed nia patrujo estas la *La Tuta Mondo*, la *Homaro*. Tial ni ne forgesu alporti ankoraŭ multe da oferoj por nia sankta afero, ke ni ankaŭ starigu eternan

monumenton de altaj idealoj, monumenton de homa interfratiĝo, monumenton por la gloro de nia kara amata gvidanto D-ro Zamenhof.

La kongreson finis la ekskurso al Zakopane kaj Tatra-montoj kie la partoprenintoj havis okazon viziti la lagojn, valojn kaj montpintojn de tiu ĉi parto de nia terглоbo.

JULIUS GLÜCK.

Wien, en monato Marto 1913.

## NOTO DE LA KOMITATO.

**Eldonante la Jubilean Albumon, ni volas informi estimatajn gesamideanojn en mallongaj vortoj pri la aranĝo de la Villa Kongreso.**

Jam senpere post la Barcelona Kongreso estis elektita en nia urbo provizora Komitato, kies tasko estis studi la aranĝon de esp. kongresoj kaj prepari la kampon en la urbo. Ĝia unua paŝo estis al estraro de la urbo, kie dum kelkfojaj konferencoj kun la urbestro, Prof. D-ro Julius Leo, estis starigataj ĉefaj punktoj de la aranĝado. Li promesis ankaŭ subteni finance la kongresan kason. — Kiam fine la Antverpena kongreso akceptis firme nian urbon kiel sidejon de la Villa, elektitaj KKKanoj, s-roj D-ro Leon Rosenstock kaj Stanislaw Rudnicki, elektis el interlokaj samideanoj Lokan Organizan Komitaton, konsistantan ne, kiel ĝis nun, el la nombro konforma kun la vicnombro de la kongreso, sed el kiel eble plej malgranda nombro de personoj, kiuj

deklaris sin pretaj kunlabori. La Komitato konsistis do el 6 personoj el Kraków kaj unu el Lwów. La prezidant-econ de Org. Kom. akceptis Univ. Prof. s-ro Odo Bujwid, sekretariecon D-ro Leon Rosenstock, s-ro Stanislaw *Rudnicki* estis Ila vicprezidanto kaj samtempe kasisto. La I. vicprezidantecon ni destinis al s-ro D-ro Szczepan *Mikolajski* el Lwów, kiel al estonta Prezidanto de la kongreso. — Tiel elektita Komitato kunvokis ĝeneralan kunvenon de ĉiuj eperantistoj Krakovaj senescepte, ĉu ili estas anoj de loka Societo „Esperanto” aŭ ne. Al tiu kunveno oni invitis diversajn konatajn personojn el la urbo, ĉiujn societojn, kiuj povis havi ian intereson en la aranĝo de la kongreso, kaj redakciojn de ĉiuj lokaj gazetoj senescepte. La tre vigla diskuto dum tiu kunveno alportis kelkajn direktivojn por la Komitato kaj samtempe altiris kelkajn personojn kaj societojn al la kunlaboro. La gazetaro komence indiferenta ekinteresiĝis, raportis pri la kunvenoj kaj tiamaniere popularigis la aferon inter la loka loĝantaro. Oni konstatis, ke la ĉefa argumento: la financa profito por la urbo, estis plej bona kaj trafa.

Por plifaciligi la korespondadon kun la Komitato ni interkonsente kun la Poŝtoficejo abonis poŝtkeston, malfermis konton en la poŝtsparkaso kaj igis ĝin nia kasisto. De nun ĉiu alveninta poŝtmandato estis rekte enpagita al poŝtsparkaso; ankaŭ ĉiu nia elspezo estis farita per ĝi. Same ankaŭ ni malfermis konton en la Ĉekbanko.

Samtempe ni klopodis pri subvencioj. Ni dissendis petskribojn al aŭstriaĵ ministroj de publikaj laboroj, de financoj, fervojoj, komerco, publika instruado, al urbestraro, Komercaĵ Ĉambroj en Kraków kaj Lwów, kaj



al diversaj institutoj. Ne ĉiuj klopodoj sukcesis, sed ni ricevis subvenciojn de ministerio por publikaj laboroj, de la urbo Kraków, de Komerca Ĉambro en Kraków kaj de Komerca Sindikato. En la klopodoj apud la registaro aŭstria multe helpis al ni nia urbestro, kiu estas deputito kaj prezidanto de tn. „Pola Klubo” en aŭstria parlamento. Ankaŭ la ministro por Galicio Eksc. s-ro Długosz sed speciale la deputito D-ro Lisiewicz tre fervore subtenis niajn klopodojn. La tutmonda esperantistaro havas multe por danki al tiuj ĉi personoj, ĉar la rondoj en la aŭstria registaro havis tre strangan opinion pri nia movado kaj oni devis multe klopodi por ĝin iomete ŝanĝi. Tio estis ankaŭ la kaŭzo, ke niaj klopodoj, por ke la Imperiestro akceptu protektadon de la kongreso, restis sen sukceso. Tamen ni devas escepti la ministerion por la milito, kiu aranĝis kurson por oficiroj kaj poste sendis delegiton al la kongreso, kaj la ministerion de fervojoj, kiu kompreninte la gravecon de Esperanto instigis ĉiujn oficistojn lerni Esperanton, eldonis gvidlibrojn kaj donis rabaton al partoprenantoj de nia kongreso, kio estas en Aŭstrio malofta okazintaĵo. Ankaŭ la ministerio de financoj meritas dankon por granda rabato ĉe la vizitado de salminejoj en Wieliczka, kies mastro ĝi estas.

Ni kreis diversajn sekciojn, en kiuj personoj kompetentaj promesis prizorgi diversajn partojn de la programo. La profesoraro de Muzika Konservatorio okupiĝis pri muzika flanko de la kongreso, jubilea festvespero ktp., kelkaj eminentaj artpentristoj kaj skulptistoj de ĉi tiea Akademio de Belaj Artoj, kun sia rektoro s-ro Axentowicz, direktis la belartan flankon. S-ro Jan Grzywinski, ĵurnalisto, estis nia redaktoro de diversaj pres-

kaŭ ĉiutagaj komunikaĵoj en lokaj gazetoj. La aranĝon de Literatura Konkurso prenis sur sin la redakcio de „Pola Esperantisto”, kiu cetere ne ŝparis monon kaj laboron por briligi la kongreson. La aktoraro, poŝtoficialoj, policanoj, kelneroj ktp. lernis fervore Esperanton, instruitaj de kelkaj samideanoj ne okupitaj en la kongreso. — Kaj nun, kiam la kongreso estas jam for, ni povas diri, ke kvankam la preparado de ĝi estis treege malfacila kaj laciga laboro, malgraŭ ke nia laboro ne povis forigi multajn antaŭjuĝojn pri ni en kelkaj landoj, kio kaŭzis, ke la nombro de partoprenintoj estis tre malalta, tamen nin kuraĝigis la fakto, ke ni trovis multajn influemajn personojn, kiuj plifaciligadis al ni tiun ĉi laboron. Ni ne povas do preterlasi tiun fakton kaj ne citi tiujn personojn, kiel ekzemple: s-rojn fervojan inspektoron D-ron Maryan Starzewski, fervojan inspektoron s-ron Franciszek Moskwa, D-ron Julian Praszill, kiuj kun plena sindonemeco helpis al ni en fervojaj aferoj, en la aranĝado en speciala vagonaro al Wieliczka kaj la Zakopane, s-ron fervojan inspektoron Potuczek, staciestron, kiu permesis al ni aranĝi la akceptejon en la stacidomo, kion ankoraŭ neniu Komitato sukcesis akiri. Ni citu ankaŭ s-ron D-ron Franciszek Aywas, urbestron de Wieliczka, kiu tiel bele preparis sian urbon por nia akcepto kaj kun helpo de tieaj sinjorinoj aranĝis tiel bon gustan bufedon en la minejo; poste s-rojn salminejo-konsilanton Józef Fryt, kiu faris ĉion eblan — eĉ eble iomete kontraŭ la instrukcio — por plifaciligi al ni la vizitadon de tiu unika en la mondo vidindaĵo. Kaj fine la Landa Turista Ligo kun sia estraro: D-ro Ludwik Schneider, vicprezidanto kaj delegito de Krakova urbestro al Organiza Komitato, s-ro konsilanto Judkiewicz, vicprezi-

danto, D-ro Rudolf Beres, sekretario de Komerca Ĉambro kaj samideano, meritas multe da danko por ilia helpo precipe en la lasta tempo. Nu, nun mankas tamen vortoj por esprimi la dankon al la direktoro de la Komerca Akademio, s-ro Józef Kannenberg, kiu donis por nia dispono la tutan konstruaĵon senpage, permesis aranĝi ĝin laŭvole kaj kaŭzis, ke ni povis aranĝi tie konvene akceptejon, vendejon, ekspozicion, pri kio sindoneme okupis sin Lvovaj samideanoj s-roj Giercuszkiwicz kaj Herold. Ankaŭ ni ŝuldas dankon al la Komitato en Zakopane, konsistanta el sinjoroj Stefan Grabczynski, estro de kuracejo, Wojciech Roj, komunumestro, Univ. Prof. Stanislaw Poniklo, Prof. D-ro Wladyslaw Kulczynski, Franc. Pawlica, D-ro Chramiec, D-ro Dluski, kiuj preparis la ekskurson al Zakopane resp. gastigis la partoprenintojn tie, kaj fine al s-roj Maryusz Zaruski kaj A. Znamiecki, kiuj gvidis nin kaj montris diversajn vidindaĵojn en la Tatramontoj. Cetere ne estas eble citi ĉiujn nomojn. *Speciala* poŝtofiĉejo, bankofiĉejo, senpaga tramveturado, vizitado de muzeoj ktp., ĉio ĉi restas merito de personoj, kiuj senkondiĉe, ĉu ili konsentas kun nia movado aŭ ne, faris ĉion eblan, por plifaciligi al ni la laboron. Dankon al ili! Dankon ankaŭ al ĉiuj partoprenintoj en la koncertoj (f-ino Ada Sari, Prof. Bursa, ĥoro, aktoraro de la „Urso”), festoj ktp., sed speciala danko al la loka gazetaro, precipe al la redaktoro de „Ilustrowany Kuryer codzienny”, s-ro Maryan Dabrowski, kiu sen ia ajn risko de nia flanko prenis sur sin la eldonadon de „Kongresa Bulteno”.

Se dum la kongresa semajno oni rimarkis kelkajn mankojn kaj erarojn en la aranĝado, ni ne riproĉas al ni, ĉar ĉiam kaj ĉie io nedezirita kaj neantaŭvidita okazas

kaj neniam oni estas sufiĉe singardema, por eviti tiajn erarojn. Ni firme esperas, ke Estimataj Kongresintoj pardonos kaj eble jam pardonis tiam al ni, kion ni opinias laŭ la libro por plendoj, metita en la akceptejo. Kiel lasta memoraĵo de ni estu tiu ĉi albumo, per kiu ni provis doni samtempe statistikon de partoprenintoj en nia kongreso. Tial ni dividis ilin laŭ landoj kaj gepatra lingvo montrita de ili sur aliĝiloj. Por montri, kiom da kongresintoj liveris la teritorio de Pollando, ni metis ilin sub speciala titolo: *Pollando*. Ni esperas, ke tia aranĝo plaĉos kaj estos samtempe bona propagandilo por Esperanto, montrante evidente al skeptikuloj ke tiom da diversaj nacioj en plena interkonsento laboris kaj amuziĝis kune dum la tuta semajno, des pli en la lando, kies lingvon oni nenie ekster ĝi lernas.

---

**SALUTO EL VARSOVIO.**

ANTONI GRABOWSKI.

Samideanoj, akceptu vi  
Korajn salutojn el Varsovi'!

Akceptu ilin, tra l' tuta mond'  
Disportu ĉien al nia rond'.

Diru, ke ankaŭ sur pola ter'  
Batas la koroj por sankt-esper',

Ke ankaŭ tie, apud Vistul',  
Renkonte brilas amik-okul',

Kaj etendiĝas fidela man',  
Sonas: „Bonvenu samidean'!”

Kvankam la nokto ĉirkaŭas nin,  
Ni kredas: Tago brilos en fin',

Leviĝos fine la ora sun',  
Kie nur steloj flagretas nun.

Ektondros laŭte triumfa kant'  
Pri fina venko de l' Esperant';

Do mi nur preĝas: Ho, donu Di',  
Ke ĝin ekaŭdu ankoraŭ mi!

## LA REVENO DE L' FILO.

(Prologo al la Krakova Kongreso).

DE ANTONI GRABOWSKI.

Post foresto multejara  
 Venas filo mia kara;  
 El migrado ĉiulanda  
 Venas filo mia granda!

En kabano mankis pano,  
 Do elmigris li, infano,  
 Nun revenas beljunulo  
 Al hejmlando, al Vistulo!

Kiel volus mi, patrino  
 Premi lin al mia sino;  
 Doni volus mi festenon,  
 Por saluti la revenon.

Ve! ne mastras mi kabanon,  
 Nek liberan havas manon;  
 Mi en mia propra domo,  
 Estas kvazaŭ fremda homo.

Ĉar al vi, fratин' pli aĝa,  
 Post kamplimo hejmvilaĝa,  
 Brilas, laŭ destino dia,  
 Stel' alia, pli radia —

Do akceptu lin, fratino,  
 Per muziko kaj per vino!  
 Li ne vidu ĉe l' festeno,  
 Kiel premas min — ĉagreno.





## ENHAVO DE L

- No. 1 **J. Glück, La ĝenerala lingvo.**
- „ 2 **M. J. Lermontov kaj D. N. Mamin-Sibirjak, Rusaj noveloj.** Tradukis A. Filatov.
- „ 3 **Teo Jung, De muheddin ĝis mundilatin.** Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.
- „ 4 **J. R. Scherer, Tra Usono kun ruliĝanta hejmo.**
- „ 5 **J. Glück, El la klasika periodo de Esperanto** (Grabowski kaj Kabe).
- „ 6 **Zamenhof, Kongresparoladoj.**
- „ 7 **Zamenhof, Kongresparoladoj.**
- „ 8 **A. Petöfi, La avo.** (El la hungara originalo tradukis Ladislao Spierer.)
- „ 9 **R. B. de Bengoa, La ĵusnaskito.** (Nekred-ebla historio. El la hispana originalo tradukis José Fernando Berenguer).
- „ 10 **Jubilea kongreso en Krakovo (1912).** Rememoroj de partopreninto.

Tuta serio de dek volumetaĵoj kostas en abono 2.50 ned. guldenojn. Unuopa numero kostas 0.35 guld. aŭ 3 internaciajn respondkuponojn.

**ESPERANTO-ELDONEJO J. MUUSSES**

PURMEREND (Nederlando)